ANTAŬEN suplemento de Informilo 4/32 decembro 2024

**Enhavo: Pri songôj, La 59-a BET, El la vivo – citaĵoj, Bondeziro**

# Pri songôj, kiuj finfine realiĝas, tamen ne ĉiam.

Laŭ iu malnova legendo antaŭ multaj jarcentoj tri cedroj ekkreskis en belegaj libanaj ĝardenoj. Cedroj kreskas malrapide, vere malrapide. Centojn da jaroj ili havis por mediti pri vivo kaj morto, pri homo kaj naturo. Ili fariĝis atestantoj de ega nombro de okazaĵoj sur nia tero. Regantoj alvenadis kaj foriradis, imperioj ekestadis kaj faladis, homoj multfoje verŝis sangon en militoj. La cedroj vidis amon kaj malamon, riĉecon kaj malriĉecon. Ili rigardis komercajn karavanojn de negocistoj kaj solecajn pilgrimantojn. Ili memoris, kiel homa parolo ŝanĝiĝis kaj kiel homoj elpensis skribon. La arboj interparolis kune nur malofte, pli ŝate ili observis kaj meditis. Sed iam komenciĝis konversacio pri la propra estonteco. „Mi spertis multe dum la jaroj,“ komencis la unua, „nur povo estas grava, tial mi ŝatus doni lignon por trono de la plej forta imperiestro en la mondo.“ „Ŝajnas al mi,“ diris la dua cedro, „ke la ĉefa afero en la mondo estas bono. Mi deziras fariĝi ilon, kiu povas ŝanĝi malbonon al bono.“„Mi estas certa, ke la plej grava estas kredo kaj animo,“ susuris la tria cedro, „mi deziras, ke homoj, kiam ili min vidos, ricevu esperon kaj kredon.“ Jardekoj pasis post jardekoj kaj unu tagon venis arbohakistoj, faligis la cedrojn kaj forportis ilin por dissegi.

La sorto ne sekvas songôjn kaj dezirojn. El la unua cedro oni konstruis stalon. El la restaĵoj laboristoj faris simplan fojnokra-

don. El la dua cedro ili faris kamparanan tablon. La ligno de la tria cedro ne estis tuj bezonata kaj restis kuŝi en deponejo. La cedroj estis ĉagrenitaj: „Kia domaĝo, ke homoj ne trovis por nia unika ligno pli noblan utilon.“ Jaroj pasis kaj dum unu nokto geedzoj sen tegmento super la kapo venis en la stalon el la unua cedro, por tranokti. Dum tiu nokto la virino naskis knabon kaj metis lin sur la fojnon en fojnokrado. En tiu momento la unua cedro eksentis, ke ĝia songôo realiĝis. Ĝi servis por la plej granda reganto sur la tero. Post tridek tri jaroj ĉe la tablo de la dua cedro sidiĝis dek du disĉiploj kun majstro antaŭ la vespermanĝo. La dua cedro ekkomprenis, ke ĝi ne nur portas pokalojn da vino kaj pladojn kun pano, sed ke ankaŭ okazas kuniĝo de Homo kun Dio.

La sekvan tagon el la ligno de la tria cedro ĉarpentistoj faris krucon kaj sur ĝin najlis duonmortan homon. La tria cedro teruriĝis kaj ekploris pri la sorto de si mem kaj la sorto de la homo, najlita sur ĝi. Eĉ tri tagoj ne pasis kaj la homo fariĝis Lumo de la mondo kaj la kruco mem fariĝis simbolo de kredo.Tiel realiĝis sorto de la tri cedroj. Kiel kutime okazas ĉe la songôj – tute alie ol oni povas imagi.

El la interreto tradukis B.H.

## Estimataj kaj karaj

la 59-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio de la 5-a ĝis la 13-a de julio 2025, ĉi-foje en la dua urbo de Litovio Kaunas, en la universitato Vytautas La Granda, kiu kun la Monda Centro de Litovoj estas kunorganizanto de BET-59. Litova Esperanto-Asocio invitas Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. Detalaj informoj pri la aranĝo

estas en Informa bulteno pri BET-59 ĉi-tie: https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/Reta aliĝilo al BET-59 estas trovebla ĉi-tie: https://mallonge.net/bet59 BET-59 havas ĉiuflankan subtenon kaj helpon de urbaj instancoj de Kaunas kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio. Partoprenantoj de BET-59 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. BET-59 estos vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo, kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa. Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn. Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-59 estas en ties retejo: http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59
Aparta rubriko pri BET-59 estas ankaŭ en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo:https://sezonoj.ru/ Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-59 liveras ankaŭ la Eventa Servo:https://eventaservo.org/e/BET-59 Listo de jamaj aliĝintoj al BET-59 estas ĉi-tie: http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=bet59&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=15 Artikolo pri la urbo de BET-59 Kaunas estas ĉi-tie:https://sezonoj.ru/2024/09/bet-148/Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie: http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5
Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu-ĉi grava internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri la sekvontjara BET-59 tra diversaj internaciaj kaj Vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj.
La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu

mem kaj invitu la aliajn. Esperante ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos.

Amike, Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Prezidanto de Organiza komitato de BET-59 Tel. mobil. +370 687 12219 , pjegorovas@yahoo.com

## El la vivo - citaĵoj

Kiu ne vidas la eraron en sia konduto, neniam ŝanĝiĝos... Kaj certe ne tiu, kiu ĉiam kulpigas la aliajn pro eraroj!

Klaĉoj estas inventataj de enviantoj, disvastigataj de malsaĝuloj kaj kredataj nur de idiotoj.

Se vi vundas bonan homon, li ne repagos vin, sed foriros kaj neniam revenos. Kaj tio vundos vin.

Soleco instruis al mi, ke mia interna paco valoras pli ol iu ajn kompanio. El la interreto tradukis L.S.



**Ĝojplenan Kristnaskon** kaj firman sanon, feliĉon, sukcesojn kaj bonhumoron en la nova jaro 2025 sincere deziras al vi

Mirka kaj Ludmila.